

*"Mi nur devas fari tion unue,
kaj poste mi venos al vi",
mi diris al la eta infano,
kiu volis montri sian belan domon de "Lego",
kiun li konstruis.*

*Kiam mi opinias ke mi havas tempon,
la eta infano jam dormas inter la Lego-pecoj.*

*"Mi nur devas telefoni al iu unue",
Mi diras al la dekumulino,
kiu havas ion gravan sur sia koro por diri.
Kiam la longa telefonparolado estas finita,
la dekumulino jam foriris al io alia.*

*"Mi nur devas labori ankoraŭ dum kelkaj semajnoj",
mi diras al mia maljuna patrino,
kiu volas ke mi venu al ŝi.
Kiam la libertempo venas,
la patrino jam malaperis en la nebulojn.*

*Kial tio: mi nur devas . . . ?
Estas kiel muraj obstakloj por fari la plej gravan
nun kaj ĉi tie.
Nian tempon ni havas ĝuste nun.*

MIA POĔMO

Maggie Eljenmyr, Svedio,
Esperantigis Anna Landfors.
kun afabla permeso

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,

FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,

CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio

☎ +(0)420 723 672 335;

✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,

HU 1072 Budapest, Hungario

☎ +36 302 000 306;

✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;

☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Membroj de IKUE pagas €10,-. Abonoj
pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

Unu viro havis du filojn	99
Li venis por morti, li trovis eternan vivon	102
Ekslibrisoj	105
Valdemar Langlet	109
Recenzo	113
Invito al ekumena kongreso	114
Aliĝilo	115
Informetoj	118
Alfa kaj Omega	119
En la biblio	120

Redaktoraj vortoj

La jena numero de nia gazeto en-
Lhavas vere variajn artikolojn. Tiuj
artikoloj bone montras ke en ĉiu temo
troviĝas io por lerni; se temas pri nia
lingva historio, pri la bazo de nia kredo,
pri la amo al libroj, pri homa vivo.

Por mi estas granda ĝojo ke ni povas
esprimi tiom da diversaj temoj per
Esperanto. Miaj studoj en Poznan, kiuj
nun finis, montris al mi la riĉecon, kiu
estas je nia dispono pere de Esperanto,
se ni iom malfermas nin al aliaj kulturoj.
Tro facile ni restas ĉe nia hejma kulturo
kaj ne larĝigas nian konon pri aliaj
homoj, pri iliaj kulturoj kaj vivkondiĉoj.

Kiel kristano estas grave ke mi pri-
dubas miajn antaŭjuĝojn kaj ke mi per
amo kaj scivolemo alproksimiĝas al alia
homo kaj aŭskultas lian/ŝian historion.
Tro ofte nuntempe, mi bedaŭrinde pli
multe aŭdas pri distancigo de aliaj
popoloj kaj pri emo izoliĝi. Tion ni
devas kontraŭstari.

Tiel la bunta enhavo de nia gazeto
gvidis miajn pensojn. Kien gvidos la
enhavo viajn pensojn?

Unu viro havis du filojn

Diservo dum la Universala kongreso de Esperanto
en Seulo, Suda Koreio

Leif NORDENSTORM, SE

Unu viro havis du filojn. Ĉu estas grava por ni ĉu ni havas gefratojn aŭ ne? Certe! Ankaŭ psiĥologoj komencis atenti ke la rilato inter gefratoj estas grava por la homo. Psiĥologoj antaŭe, antaŭ ĉio, atentis la rilaton inter infano kaj patrino. Sigmund Freud, kies patro mortis frue multe analizis la rilaton inter patro kaj infano. Tamen, kiam flegato rakontis ke estis problemo en la rilato inter li kaj frato aŭ fratino, Freud kutime konkludis ke temas pri problemo en la rilato al la

patro. Modernaj psiĥologoj nun komprenas ke ankaŭ rilatoj al gefratoj estas gravaj.

Tion la verkintoj de la Biblio komprenis antaŭ longa tempo. Jam en la kvara ĉapitro de la Biblio ni legas pri la konflikto inter Kain kaj Habel. En la 34a ĉapitro de Genezo ni legas pri la amo kaj amoro inter Dina kaj Ŝeĥem kaj pri la perforta interveno de ŝiaj fratoj.

Pli ol dek ĉapitroj en Genezo, unua libro de Moseo, temas pri la konflikto inter Jozef kaj liaj fratoj kaj pri la sekvoj

Luk 15:11-24

11 Kaj li diris: Unu viro havis du filojn; 12 kaj la pli juna diris al sia patro: Patro, donu al mi la heredotan parton de la havo. Kaj li dividis inter ili siajn vivrimedojn. 13 Kaj post ne multaj tagoj la pli juna, kolektinte ĉion, forvojaĝis al malproksima lando; kaj tie li disperdis sian havon per diboĉa vivado. 14 Kaj kiam li jam elspezis ĉion, forta malsato okazis en tiu lando, kaj li komencis havi mankon. 15 Kaj li iris, kaj aliĝis al unu el la loĝantoj de tiu lando; kaj ĉi tiu lin sendis sur siajn kampojn, por paŝti porkojn. 16 Kaj li deziris plenigi sian ventron per la karboj, kiujn la porkoj manĝis; kaj neniu donis al li. 17 Sed reveninte al si, li diris: Kiom da dungitoj de mia patro havas panon abunde, sed mi ĉi tie pereas de malsato! 18 Mi levigoj, kaj iros al mia patro, kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi; 19 mi jam ne meritas esti nomata via filo; faru min kiel unu el viaj dungitoj. 20 Kaj li levigis, kaj iris al sia patro. Sed kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis kaj kortuŝigis, kaj kurinte, falis sur lian kolon kaj lin kisadis. 21 Kaj la filo diris al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne meritas esti nomata via filo. 22 Kaj diris la patro al siaj servistoj: Alportu rapide la ĉefan robon, kaj lin vestu, kaj metu ringon sur lian manon kaj ŝuojn sur liajn piedojn; 23 kaj alportu la grasigitan bovidon kaj buĉu ĝin, kaj ni manĝu kaj estu gajaj; 24 ĉar ĉi tiu mia filo estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita. Kaj ili komencis esti gajaj.

de tio. (Inter parenteze ni diru ke tiu ĉi rakonto preskaŭ ne mencias Dion, sed ĝi nur temas pri la okazaĵoj ĉirkaŭ Jozef.)

Kaj nun: Jesuo, per Sankta Luko, donis al ni rakonton pri la filo, kiu lasis sian hejmon, disperdis sian havon, revenis al la patro, kiu kortuŝiĝis, falis sur lian kolon, lin kisadis kaj pardonis lin. Ni ankaŭ aŭdis pri la pli maljuna filo, kiu enviis la junan pro la festo, kaj koleris.

Kion ni lernu de tiu ĉi rakonto?

- Ni lernu ke estas tute natura afero ke junulo volas liberiĝi de siaj gepatroj. Tiu ĉi patro estis saĝa, ĉar li ne malebligis la liberiĝon de sia filo. Ĉar la patro ne volis reteni la filon, la filo en sia posta mizero en la porkejo, povis pensi pri sia patro kaj vere voli reveni. Se la patro klopodus reteni la filon hejme perforte, la filo tamen verŝajne fuĝus, kaj poste en mizero, ne volus reiri hejmen.
- Ni lernu ke konfliktoj okazas ĉie, kie homoj renkontiĝas. Konfliktoj kaj konfliktegoj. Tio estas natura afero. Konfliktoj kompreneble okazas ankaŭ inter gepatroj kaj gefiloj, kaj inter gefratoj. Konfliktoj ankaŭ okazas inter kristanoj kaj inter esperantistoj.
- Se konfliktoj estas natura afero, solvado de konfliktoj ne estas same natura. Tion ni devas lerni. El la rakonto ni povas kompreni ke la patro estis bona patro por la juna filo. Li donis al li duonon de sia havaĵo. Li donis al li liberon. Li pardonis lin kaj aranĝis por li feston, kiam li revenis. Ĉu la patro estis bona patro ankaŭ por

la dua filo? Tion ni ne same facile povas juĝi. Ĉu la patro neniam donis al la pli aĝa filo kapridon? Ĉu la pli aĝa filo havis aliajn kialojn por esti suspektema ĉe la reveno de la pli juna frato? Ni ne scias.

- La plej grava instruo, kiun ni prenu el tiu ĉi rakonto, estas ke ni atentu ke la rilatoj inter gefratoj povas esti tute bonaj, aŭ malbonaj. Ni atentu tion en la rilatoj inter niaj gefratoj, inter niaj gepatroj kaj iliaj gefratoj, en la rilatoj inter niaj gefiloj, k.t.p. La rakonto estas ankaŭ ne tute finita. Ni ne scias ĉu kaj kiel la patro kaj la pli aĝa filo reamikiĝis. Tio montras ke ne ekzistas iaj ekzaktaj solvoj. Ni devas mem inventi solvon por niaj propraj konfliktoj.

En tiu ĉi jaro oni en multaj landoj festas la 500-jariĝon de la reformacio, ĉar antaŭ 500 jaroj, en 1517, Marteno Luther en Germanio, fiksas dokumenton kun 95 tezoj sur la pordon de la palaca preĝejo en Vitenbergo en Germanio. En la tezoj li kritikis malbonajn aferojn en la tiama eklezio kaj postulis ŝanĝiĝojn. Ĉar Luther kaj la eklezia aŭtoritato ne sciis solvi la konflikton, ni ankoraŭ havas dividitan eklezion. Ankaŭ tie ĉi ni povas lerni ion el la rakonto pri la patro kaj la du filoj. La rakonto ne estas finita. Ekzistas espero ke la konflikto solviĝos. Ni devas plu labori pri la solvo.

La rakonto pri la patro kaj la du filoj tamen ankaŭ temas pri la rilato inter la homo kaj Dio. Jesuo donis al ni tiun ĉi rakonton por montri ke malsamaj homoj havas malsamajn vojojn al Dio. Unu homo vere fuĝas de Dio kaj perdas sian

kredon, sed povas reveni en ia momento. Eble tiu homo pli facile komprenas la amon de Dio. Alia homo vivas ĉe la sino de Dio dum sia tuta vivo. Ne okazas grandaj ŝanĝiĝoj. Por tiu homo eble estas malpli facile kompreni la amon de Dio. Eble tion oni devas ekzerci: vidi ke Dio fakte donas – eble ne kapridon – sed multan alion, kvankam ni ne rimarkas tion.



Foto David Castor (Wikipedia)

Mi ripetas la plej gravajn punktojn. El la rakonto pri la patro kaj la du filoj, ni lernu:

- Ke konfliktoj okazas.
- Ke ni devas labori pri solvado de la konfliktoj kun niaj gefratoj kaj aliaj homoj.
- Ke ni – 500 jarojn post la reformacio – devas ĉiam labori por la unueco de la kristanoj.

- Ke ni devas akcepti ke malsamaj homoj havas malsamajn vojojn al Dio, kaj danke akcepti tion, kion donis Dio al ni.



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

26. septembro

Cielia Patro, helpu min vivi sur la ĝusta spirita alteco. Pardonu miajn ŝuldojn kaj mian indiferentecon. Mi ne rigardu de supre al miaj kunhomoj, sed mi staru apud ili en iliaj zorgoj, ĉagrenoj kaj suferoj.



Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

Li venis por morti, li trovis la eternan vivon

de Mildred GOLDSMITH

Tradukis Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Antaŭ pli/malpli 45 jaroj, en la jaro 1972, nigra maljunulo vojaĝis el Usono al Porto Riko. Li iris tien por morti. Neniu konis lin, neniu sciis precize de kie li venis. Li nur diris, “La Ŝtatoj [Usono].” Li loĝis en gastejo, kie oni preparis liajn manĝojn. En tiu gastejo loĝis ankaŭ vidvino kiu ĉeestis la diservojn de nia preĝejanaro. La viro deziris trovi preĝejanaron. Do, la vidvino invitis lin al la nia. La anoj de la preĝejanaro akceptis lin kun amo kaj ĝentileco. Neniu sciis ke li estas malsana.

La nove veninta viro rapide faris decidon. Li volis kuniĝi kun la grupo de gejunuloj! Per la anoncoj, li eksciis ke la gejunuloj havos tempon de kantado ĉirkaŭ festofajro la venontan vendredon nokte. Li volis ĉeesti. La gejunuloj ĝoje akceptis lin, kaj unu el ili fariĝis lia ŝoforo. Li ne multe kunmiksiĝis, kaj li malpli parolis. Tial neniu el la gejunuloj eksciis ke li estas malsana.

La maljunulo fidele ĉeestis la kunvenojn de la gejunuloj, kaj la dimanĉajn diservojn matene, dum monato aŭ eble ses semajnoj. La lastan diservon, kiun li ĉeestis, li sidis en sia kutima loko en angulo malantaŭe de la preĝejanaro. Li plezure salutis la aliajn ĉeestantojn. Li estis sola viro, sed li ŝajnis ĝui sian novan medion.

Tiun dimanĉon, kiam mia edzo Vilĉjo faris la finan preĝon, li preĝis en tute malsama maniero — kun la helpo de la ĝentila nigra viro. Neniu sciis ke tiu estis lia lasta dimanĉo. Kaj ankoraŭ neniu sciis ke li estas malsana.

La preĝo de Vilĉjo estis tre stranga kiel fina preĝo. Certe ĝi nek estis preĝo, kiun mi aŭdis lin fari antaŭe, nek mi aŭdis lin fari poste. Kiam li preĝis, ŝajnis kiel li estus pekulo, petante ke Dio pardonu lin. Post ĉiu frazo, li haltis, kaj en tiu momento malforta voĉo respondis kun rompita, “J-j-jes!”

Rigardante, por scii kiu parolas, mi rimarkis la maljunulon forte apogante sin sur la seĝo antaŭ si. En ĉiu momento kiam Vilĉjo paŭzis, mi klare aŭdis, “J-j-jes!” Kiam finiĝis la preĝo, la ĉeestantoj foriris kaj la maljunulo, kiel kutime, estis portita al la gastejo per unu el la junuloj. Neniu ankoraŭ sciis ke li estas malsana.

Tiun semajnon, iu eksciis ke la maljunulo estas en la malsanulejo. La vicpastro kaj alia viro el la preĝejanaro vizitis lin. Ili legis el la Biblio kaj kune ili preĝis. Kiam ili revenis ili diris ke li aspektas kiel “nova viro”. Estis neniu indiko ke alproksimiĝas la morto, aŭ ke li tre malsanas. Kaj antaŭ ol Vilĉjo kaj mi havis ŝancon viziti lin, la maljunulo mortis. Ni ŝokiĝis.

Subite tie estis kadavro por esti forprenita, kaj estis neniu kiu forprenus ĝin. La najbaroj akceptis la respondecon. Ili sendis la kadavron al kadavrejo, kaj ili kolektis monon por pagi la kostojn por la enterigo. Ili planis la funebran solenaĵon por la venonta dimanĉo je la tagmezo. Sed ili forgesis ke ili bezonos la ĉeeston de pastro, aŭ eble ili pensis ke la funebrulo alvokus pastron.

Tiel, la dimanĉon de la enterigo, kiam estis tempo por la hispana diservo, Vilĉjo ricevis urĝan mesaĝon ke li nepre devas ĉeesti por prediki en funebra solenaĵo en urbo kelkajn kilometrojn distance. [En tiu tempo la preĝejanaro estis dulingva. Vilĉjo predikis unue en la angla lingvo, sekvis servo de kantado, kaj poste li predikis en la hispana lingvo.]

Pro tio, ke Vilĉjo kaj la vicpastro estis okupataj ĝis la tagmezo, ni decidis ke mi tuj iru, komencu la funebran solenaĵon, kaj ili venos kiam ili povos. Vilĉjo kaj la vicpastro estis certaj ke ili alvenos je la tempo por iri al la tombejo. Preninte unu el la junulinoj, ni ekiris. Survoje, ni decidis ke mi preĝos, ŝi kantos, mi legos la Psalmon 23, kaj ŝi estos preta kanti se la pastroj ankoraŭ ne alvenus.

Kiam ni alvenis al la kadavrejo, la funebrulo panikis. Neniu pastro ĉeestas, kaj li devas enterigi ĉi tiun homon! “Ho, vi venas por deĵori la funebran solenaĵon,” iu diris al mi. “Ne,” mi respondis. “La pastro ĉeestos por iri al la tombejo. Mi estas ĉi tie por reprezenti lin, kaj mi helpos kiel mi povas.” Bone, tio signifis ke mi predikos. Ili informis la funebrulon ke la funebra solenaĵo povas komenciĝi.

La maljunulo nur parolis la anglan lingvon. Liaj geamikoj el la najbaraĵo estis tiuj, kiuj ankaŭ parolas la anglan lingvon. Tial mi ne maltrankviliĝis pri misuzi la hispanan lingvon, kiam mi penos prediki la unuan fojon dum funebra solenaĵo.

Post la preĝo kaj himno, mi legis la Psalmon 23, kaj mi rakontis al la najbaroj pri la preĝo de la maljunulo, la pasintan dimanĉon. Komencante kun la fakto ke neniu sciis pri lia pasinteco — eĉ ne, ke li estis malsana; neniu sciis ke li venis al Porto Riko por morti. Sed li venis ankaŭ por serĉi la Grandan Ŝafiston [Jesuo Kristo]. Mi povis certigi ke la maljunulo renkontis Lin kaj ke li faris tion per prononci unu solan vorton — la vorton “Jes.” Mi sciis tion ĉar mi malfermis la okulojn kaj mi rigardis kun miro kiam li preĝis la preĝon de pekulo kun la pastro:

“Mi estas pekulo.” “J-j-jes!”

“Mi estis ofendanta Vin.” “J-j-jes!”

“Eniru, mi petas, en mian vivon ...”

“J-j-jes!”

“kaj fariĝu mia Savanto.” “J-j-jes!”

“Pardonu min, . . . ” “J-j-jes!”

“kaj faru Vian amon reala ĉe mi.”

“J-j-jes!”

“Mi volas esti Via nun kaj por ĉiam.”

“J-j-jes!”

Mi finis por rememorigi ĉiujn, ke estas unu sola vojo al la Savanto: la sama vojo kiun nia nigra amiko prenis: la vojo de “Jes!” “Jes, mi estas pekulo.” “Jes, mi estis ofendanta Vin.” “Jes, eniru en mian vivon, kaj fariĝu mia Savanto.” “Jes, pardonu min, kaj faru Vian amon reala ĉe mi.” “Jes, mi volas esti Via nun

kaj por ĉiam.”


Estis tempo por iri al tombejo kaj la pastro ne aperis. Kion fari? Sed la funebrulo estis preta iri tien. Mi devis iri ankaŭ por paroli dum la enterigo. Mi sciis ke la Sinjoro devas helpi min aŭ tio estus katastrofo.

Alvenante al la tombejo, mi rimarkis ke la aŭdantaro pligrandiĝis. Do, mi rakontis denove pri la fina serĉo por Dio fare de la nigra viro, kaj lia subita morto. Tiam mi rakontis pri la morto de mia propra avo Cummings kiu antaŭ nelonge forpasis. Mi diris:

“La lastan fojon kiam mi vidis mian avon estis du jaroj antaŭ lia morto. Li akompanis Vilĉjon kaj min al tombejo por montri kie li estos enterigota. Li indikis diversajn tombojn kie iuj el liaj geamikoj ripozas. Li jam atendas la morton kaj li vidas antaŭen la releviĝon. Kun larmoj de antcipio, li diris, “En la mateno de la releviĝo okazos grandega tumulto en ĉi tiu angulo de la tombejo!” Li sentime bonvenigis tiun tagon.

“Hodiaŭ,” mi daŭrigis, “ĉi tie ripozas la avo de alia homo. Estas granda privilegio akompani lin al la loko kie li ankaŭ atendas la matenon de la releviĝo. Ne ĉiu homo kiu venas al la morto povas certiĝi pri la releviĝo de la savitoj. Nur tiuj homoj, kiel ĉi tiu viro kaj mia avo, kiuj diras, “Jes!,” al Dio de la ĉielo povas iri al siaj tomboj kun tia benita certeco.”

“Ĉar la Sinjoro mem malsupreniros de la ĉielo, kun signalkrio, kun la voĉo de la ĉefanĝelo, kaj kun la trumpeto de Dio; kaj **la mortintoj en Kristo leviĝos la unuaj**; poste ni [la kredantoj en Jesuo Kristo], kiuj vivas, ankoraŭ restantaj, estos kune kun ili suprenkaptitaj en la nubojn, por renkonti la Sinjoron en la aero; **kaj tiel ni estos por ĉiam kun la Sinjoro.**” (1 Tes 4: 16, 17)



NE MALTAKSU VIAN KUNULON

Du reelaj nombroj (6 kaj 0) diskutas pri siaj grandecoj.

- 6 diras al 0: Mi estas pli granda ol vi!
- 0 malkontentas; ligas sian zonon kaj fariĝas 8 kaj montras sin al 6.
- Subite 6 renversas kaj fariĝas 9 kaj traktas 8 kiel bastardon!
- 8 kuŝiĝas sur la teron kaj fariĝas senfina kaj diras al li, provu ekkapti min.

Nur por diri al vi, ke ni neniam devas subtaksi individuon, ĉar ni ne scias, kian postenon li havos morgaŭ. La rado turniĝas kaj daŭre turniĝas. Kia humileco kiam ni vidas aliajn super ni!

Redaktita de Honoré SEBUHORO

Ekslibrisoj

prelego dum la kongreso en Zöblitz

Gabriella STIER, RO

La vorto ekslibriso originas el la latinaj vortoj *ex libris meis* – el miaj libroj. Ĝi signifas libro-signaĵon aŭ libromarkaĵon kaj spegulas la amon pri libroj.

Jam en antikva epoko, en la biblioteko de egipta faraono Amenhotep la 3-a (en la jaro ĉirkaŭ 1400 a. Kr.), la skatoletoj enhavantaj la papirusajn rulaĵojn estis markitaj per blue emajlitaj ceramikaj tabuletoj, kiuj indikis la posedantojn. Tio signifas, ke libroj komence de la plej malnovaj tempoj estis konsiderataj kiel valoraj objektoj. Tial en mezepoko la libroj ofte estis al vendejaj tabloj aŭ bibliotekaj bretoj eĉ fiksitaj per ĉenoj.

Same kiel antaŭ la eltrovo de libro-presado, ankaŭ nun posedantoj kutimas en siajn librojn enskribi siajn nomojn. Multfoje oni al la nomoj aldonas sentencojn, poemetojn kaj humurajn diraĵojn al konatuloj, por ke ili ne forgesu redoni prunteprenitajn librojn al la posedantoj.

Iu libroamanto ekhavis bonan ideon. Li engluis en sian libron peceton de papero kun sia nomo, kiu estis ornamita per iu desegnaĵo. Tiun ĉi folieton oni povas konsideri antaŭulon de la ekslibriso. Nuna ekslibriso estas folieto kun gravurita aŭ presita desegnaĵo, multobligita, markante la posedanton. Oni gluas ĝin sur la unuan internan



Gabriella STIER prelegas pri ekslibrisoj.

kovrilpaĝon. La ekslibriso ne nur indikas la posedanton, sed ankaŭ ornamas la libron.

Varianto de la ekslibriso estas supra-libroso, kiu estas presita aŭ desegnita sur la unuan eksteran kovrilpaĝon. Plej ofte ĝi prezentas blazonon de la posedanto. La libroj kun supralibrosoj troviĝas ekzemple en la biblioteko de Matiaso la 1-a (Hunyadi Mátyás 1443–1490) aŭ en bibliotekoj de aliaj riĉaj nobelaj libroamantoj.

La ekslibrisoj estas kreitaj de grafikistoj kaj prezentas belartaĵojn. Ili apartenas al klaso de eta grafiko. Spite de

siaj etecoj la ekslibrisoj povas havi grandan artan valoron.

La ekslibriso enhavas nomon de la posedanto, vortojn „Ex libris”, simbolan desegnaĵon, iam frazon, proverbon, aforismon, la signon de la artisto kaj informon pri uzita grafika tekniko.

La plej malnova konata ekslibriso estis kreita en Germanio inter la jaroj 1470–1480. Tio estas ksilografajo de nekonata artisto, prezentanta erinacon. La posedanto estis la kapelano Hans Knabensberg, kromnome Iglar (Igel germane signifas erinacon). La ekslibriso enhavas humuran surskribon: *Das dich ein Igel küsst* – Kisu vin unu erinaco.

En la mezepoko la kreado de ekslibrisoj rapide evoluis. La unuajn ekslibrisojn pretigis Albrecht Dürer (1471–1528). Li kreis la plej konatan ekslibrison, ksilografajo en la jaro 1505, por sia amiko Willibald Pirckheimer.



La unua ekslibriso. Erinaco


La ekslibriso prezentas blazonon, kaj la surskribon: *Inicium sapientie timor Domini* – Komenco de la saĝeco estas la timo antaŭ la Eternulo. Alia surskribo estas: *Sibi et amicis* – Al mi kaj miaj amikoj.

La plej konataj artistoj, kiuj okupiĝis pri kreado de la ekslibrisoj, estis Lukas Cranach (1472–1553), Hans Holbein (1497–1543), François Boucher (1703–1770), Frans Masereel (1889–1972).

La enhavo de la ekslibrisoj ŝanĝiĝis de epoko al epoko kaŭze de ekonomiaj



Albrecht Dürer: Ekslibriso por Willibald Pirckheimer. X2



Heraldika ekslibriso de nobela familio Teleki el Transilvanio.

rilatoj kaj artaj tendencoj. La unuaj ekslibrisoj, kies posedantoj estis aŭ nobeloj aŭ preĝejoj bibliotekoj, prezentis blazonojn. Tial ili nomiĝas heraldikaj ekslibrisoj. Plimulto de ekslibrisoj, kiuj estis kreitaj antaŭ la 19-a jarcento, apartenas al la heraldikaĵoj.

Poste la blazonoj estis anstataŭitaj per diversaj temoj, ekzemple bibliotekaj internoj, portretoj, desegnaĵoj rilate al diversaj metioj, simbolaj desegnaĵoj, ornamaj desegnaĵoj kun floroj kaj aliaj, kiuj simbole prezentis la personecon aŭ ŝatokupon de la libroposedanto.

Ankaŭ prezentitaj surskriboj estas interesaj: *Voces paginarum* – Voĉo de la paĝoj. *Sol lucet omnibus* – La suno brilas por ĉiuj. *Inter folia fructus* – Inter folioj estas la fruktoj.

La ekslibriso enhavas traŝan desegnaĵon, kiu karakterizas la posedanton, pro tio oni nomis ĝin „epigramo de la belartaĵo”.

La teĥnikoj uzataj por kreado de ekslibrisoj, estas variaj. Procezo de farado komenciĝas per desegnado, poste la artisto gravuras la negativon de la desegno en diversajn materialojn (metalojn, lignon, plastan materialon, ŝtonon) aŭ povas uzi tipografian metodon. Tiel oni obtenas la matricon (kliŝon), kiu estas negativo de la gravurita desegnaĵo. Ĉi tiu matrico estas uzita por permana multobligado aŭ maŝina presado.

La uzitan teĥnikon oni povas rekoni danke al „Siglo de Barcelona”, enskribita sur la ekslibrison. Ĉiuj sigloj estas koditaj signoj, kiuj indikas la uzitan teĥnikon al la preparo de la ekslibriso. Ekzemple:



Kreado de ekslibriso: kliŝo kaj preta ekzemplero, Paul Dobreanu, X5

- C1 – ŝtalgravuraĵo,
- C2 – kuprogravuraĵo,
- C3 – akvaŝto,
- X1 – ligno gravuraĵo,
- X2 – ksilografado,
- X3 – linogravuraĵo,
- X4 – plumbogravuraĵo,
- X5 – zinkografio,
- L – litografio,
- P – fotomeĥanikaj metodoj ktp.

La rolo de la ekslibrisoj ne estas nur indiko de posedanto aŭ beligado de la libroj, sed la ekslibrisoj ankaŭ estas ŝatataj objektoj de kolektado, havante sian propran vivon.

La ekslibrisojn kolektas libroamantoj, bibliofiloj, kiuj ŝanĝas ĉi tiujn etajn artaĵojn inter si. La kolektantoj de ekslibrisoj grupiĝas en societoj, asocioj, ili renkontiĝas en kongresoj kaj aliaj eventoj. En la jaro 1962 la 9-a Eŭropa Kongreso de Ekslibriso transformiĝis al la 1-a Tutmonda Kongreso de Ekslibriso (FISAE), kie la kolektantoj kaj grafikistoj renkontiĝas po du jaroj. Oni kutimas organizi ekspoziciojn kun katalogoj, konkursojn de kreado de ekslibrisoj kaj eldonas eĉ revuojn.

Elstara kolektanto de ekslibrisoj, kiu loĝis en la urbo Brno, estis Mirko Riedl (1920–2013). Li sukcesis kolekti 17 000

ekslibrisojn. Li donacis sian valoran kolekton al Moravia Galerio de Brno.

La ekslibrisoj havas gravan rolon en historio de libroj, ĉar oni eĉ post jarcentoj povas determini la originon de ekzamenataj libroj. Ili estas kreitaj de plej elstaraj artistoj, pro tio ili havas signifon ankaŭ por arta historio.

La ekslibrisoj havas grandan valoron en la disvastigo de humaneco, amikeco kaj paco, ĉar ili parolas la internacian lingvon de la arto.

La kreado kaj la kolektado de ekslibrisoj esprimas la altan aprezaĵon, estimadon de la libro. Ĉiuj bibliofiloj kaj kolektantoj de ekslibrisoj estas ligitaj sub devizo: *Amor librorum nos unit* – La amo de la libroj unuigas nin.

Por plia legado

AŬTORA KOLEKTIVO (1981): Romániai magyar irodalmi lexikon. Szépirodalom, köztírás, tudományos irodalom, művelődés. I kötet. A-F. 1-a eld. Bukarest, Kriterion Könyvkiadó, 650p.

DEÉ NAGY, A. (2001): A marosvásár-

helyi Teleki-Bólyai Könyvtár ex librisei. 1-a eld. Balassi Kiadó Budapest-Polis Könyvkiadó Kolozsvár.

ENYEDI, I. & STIER, G. (2009): Nemzeti, egyházi kincsünk – A szatmárnémeti ferencesek könyvtára. 1-a eld. Profundis Kiadó. Szatmárnémeti, 246 p.

DÉNES, G (1968): Az ex libris múltja, jelene és jövője. Korunk 6.

KERESZTURY, D. (1981): Híres magyar könyvtárak. Budapest, RTV-Minerva, 138 p.

SEMSEY, A. (1982): Exlibris és heraldika. Kisgrafika. Kisgrafika barátok köre értesítője. "2. p. 2-4.

STIER, I. (1997): Ex-libris. Filigran. Revistă editată de Biblioteca Județeană Satu Mare 1: 8-9.

STIER, I. (2000): Pledo por Esperantista Societo de Ekslibris-Kolektantoj. Bazaro. Esperantlingva revuo. Kluĵo. Rumanio. 4, 2(13), Somero.


STIER, I. (1990): Pentru o activitate ex-libristică liberă. Univers Sătmărean 1: 7.

☪

Kazinczy Gábor:
Patrino kun infano, C3;



Torró Vilmos: Memore de
Lucas Cranach, X3;



Vén Zoltán: Johann
Sebastian Bach, C2



Valdemar Langlet

Esperanta pioniro

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Por la svedaj esperantistoj Valdemar Langlet [lanle'] estas grava pioniro, ĉar inter alie li estis unu el la fondintoj de la Esperanto-klubo en Upsalo 1891, la dua klubo en la mondo. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la klubo. Poste li estis prezidanto ankaŭ de la Sveda Esperanto-Federacio.

Multaj svedaj esperantistoj alte estimas Langlet ankaŭ pro lia agado en Budapeŝto dum la dua mondmilito, ĉar li savis multajn judojn. Sed lia agado estas preskaŭ forgesita en la ombro de la pli konata svedo Raoul Wallenberg.

Mallonga biografio

La praaĵoj de Langlet origine venis el Francio, el kiuj unu estis la pastoro Philippe Langlet, kiu estis murdita en la jaro 1572 inter aliaj 10 000 hugenotoj.

Sed la patro de Valdemar, Emil Langlet, jam naskiĝis en Svedio. Post diversaj studoj la patro iĝis arĥitekto kaj desegnis kaj konstruis plurajn gravajn konstruaĵojn, inter alie preĝejojn, kaj en Svedio kaj eksterlande. Dum sia profesia vivo la patro estis ankaŭ redaktoro.

La patrino, Mathilda Langlet, estis verkistino, eldonis gazeton kaj ankaŭ tradukis plurajn verkojn. Valdemar ŝajne heredis de ŝi la literaturan kaj lingvan talenton. Laŭ informo Valdemar scipovis 11 lingvojn.



Valdemar naskiĝis la 17-an de decembro 1872 en malgranda paroĥejo Lerbo sudokcidente de Stokholmo. Li estis la kvara kaj la plej juna filo en la familio. Li mortis la 16-an de oktobro 1960 en Stokholmo.

Li laboris kiel ĵurnalisto kaj poste redaktoro de diversaj renomaj svedaj gazetoj. Li verkis librojn pri aktualaj temoj, eĉ 10-voluman historian verkon pri la unua mondmilito kune kun la sveda historiisto C.O. Nordensvan (ne la finna esperantista pioniro). Li ankaŭ verkis pri siaj longaj vojaĝoj en Rusio kaj Hungario.

Dufoje li edziĝis. Unue en la jaro 1899 kun finna esperantistino Signe Blomberg. Tio estis la unua esperanta geedziĝo. Kun ŝi, Langlet, havis du

filojn. Ŝi mortis en 1921. Li poste renkontis rusinon Nina Borovko, filino de la rusa esperanta pioniro Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko kaj en la jaro 1925 ili geedziĝis.

Lia esperanta vivo

Jam en sia junaĝo, dum siaj studoj en Upsalo, Valdemar ekkonis Esperanton. Li ankaŭ lernis Volapükon, la plej uzata planlingvo antaŭ Esperanto.

Valdemar iĝis humanisto post li forlasis la teologiajn studojn. Kune kun kelkaj studamikoj li fondis en Upsalo la unuan Esperanto-klubon en Svedio kaj la duan en la mondo. Li ankaŭ kunfondis la gazeton Lingvo Internacia en la jaro 1895. La saman jaron, 1895, li kune kun amiko biciklis tra Finnlando al Ruslando, Turkio, Hungario kaj Aŭstrio. Dum la vojaĝo li ekŝatis Hungarion kaj decidis reveni, kion li faris jam sekvontjare. Dum la vojaĝo la du amikoj uzis nur la svedan kaj la esperantan lingvojn.

Dum tiu vojaĝo Valdemar, inter multaj aliaj, renkontiĝis kun la rusa pioniro Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko en Odeso kaj lia estonta edzino Antonia Ĉajkovskaja. Tiu paro la sekvan jaron naskis la filinon Nina, kiu 30 jarojn poste edziniĝis al Langlet.

La jaron 1896 Valdemar denove vizitis Ruslandon, kaj ankaŭ en 1898. Tiam li renkontis Lev Tolstoj, pri kio li skribas en sia vojaĝrakonto 1898. Iam, dum tiuj lastaj jaroj de la 19a jarcento, Valdemar renkontis, per Esperanto, Signe Blomberg, al kiu li edziĝis 1899.

En 1921 la edzino mortis, kaj Valdemar restis sola kun la du infanoj. La

gazeto Svenska Dagbladet, kie li laboris, sendis lin al Ruslando kaj Moskvo en 1923. Li vizitis Esperanto-klubon kaj per tiu kontakto li eksciis ke lia konatulo Borovko el Odeso jam mortis, sed liaj vidvino kaj infanoj nun loĝas en Moskvo. Valdemar sukcesis aranĝi renkontiĝon kun la familio la sekvan tagon. Dum tiu renkontiĝo en Moskvo Valdemar parolis kvar lingvojn, po unu al ĉiu familia membro: esperante kun la patrino, france kun la fratino, ruse kun la frato kaj germane kun Nina.

Montriĝis ke la familio malriĉege vivis. Valdemar ofertis helpon kaj proponis, ke unu infano loĝu kun li en Svedio dum unu jaro. La patrino proponis, ke Nina kaptu tiun eblecon ĉar tiel ŝi povus daŭrigi sian muzikstudadon. Pro malfacilaĵoj en tiutempa Sovetunio, Nina nur sekvontjare povis vojaĝi al Svedio. Anstataŭ reiri al Sovetunio, Nina edziniĝis al Valdemar en la jaro 1925.



Agado en Budapeŝto dum la milito
La restado en Svedio ne multe plaĉis al Nina, kaj ŝi poste esprimis ke ŝi pli bone sentis sin en Budapeŝto. Ankaŭ al Valdemar Langlet Hungario multe plaĉis kaj jam antaŭe li plurfoje vojaĝis tien. Ili transloĝiĝis en 1932 al Budapeŝto kaj Valdemar estis instruisto de la sveda lingvo. Krome li tradukis hungarajn

aŭtorojn al la sveda. Valdemar depost 1938 komencis labori senpage ĉe la sveda konsulejo pri kulturaj aferoj. Ĉirkaŭ la paro estis vigla kultura kaj amikeca vivo kaj inter la geamikoj estis multaj judoj. En 1936 vizitis ilin la tiam sveda kronprincino Louise kiu poste fariĝis sveda reĝino. Kiam Germanio konektis Aŭstrion, la sveda legacio en Vieno estis translokigita al Budapeŝto.

La persekutadoj de judoj fortiĝis dum tiu tempo en Germanio kaj apudaj landoj. En 1941 kaj Germanio kaj Hungario deklaris militon kontraŭ Sovetunio. La judoj kaj ankaŭ aliaj persekutatoj sentis sin minacataj. Unue ili petis la familion Langlet gardi iliajn valoraĵojn sed poste pluraj eĉ loĝis ĉe ili kvankam la loĝejo estis malgranda.

Post la alveno de la germanoj al Hungario en marto 1944, Valdemar fortigis sian helpan laboron. Tiam li jam estis 72-jara. Li kreis la Svedan Ruĝ-Krucan organizaĵon kaj pluraj institucioj petis ĝian helpon, ekzemple malsanulejoj, monaĥejoj, muzeoj kaj aliaj petis ke ili estu sub la ŝirmo de la Sveda Ruĝa Kruco. En julio 1944 venis Raoul Wallenberg, kiu en la nomo de la sveda legacio ankaŭ savis multajn persekutatojn. Raoul Wallenberg malaperis la 17an de januaro 1945.

En 1945, kiam la rusoj jam okupis la Peŝt-flankon, Valdemar estis la sola membro en la sveda legacio kaj li fokusigis sian laboron pli al socialaj problemoj en formo de helpa komitato. Sed venis ordono de Svedio ke li revenu hejmen. La hejmenvojaĝo estis iom aventura, ĉar la trajno, anstataŭ iri al la

origina celo Moskvo, estis redirektita al Turkio. De tie per ŝipo ili vojaĝis al Gotenburgo. Ili komencis la vojaĝon en majo kaj alvenis al Svedio la 2an de septembro en 1945.

Postaj jaroj

Ree en Svedio Valdemar organizis Helpkomitaton, kiu sub gvidado de Folke Bernadotte (kuzo de la posta sveda reĝo Gustav VI), havis la celon helpi Hungarion. En 1945 Valdemar verkis sian libron *Agadoj kaj tagoj en Budapeŝto* kies honorarion li donis al tiu komitato.

Kvankam troviĝas multaj atestoj pri la agado de Valdemar Langlet, la paro ne ricevis oficialan aprezon en Svedio. Kontraŭe, la raportoj, kiujn ili skribis kaj transdonis al la Sveda Ruĝa Kruco ne estis bonvenaj kaj aliaj dokumentoj estis sekretigitaj dum 50 jaroj, ĝis 1995.

Kiam ĉirkaŭ 70 helpantoj kaj laborantoj ĉe la sveda legacio en Hungario ricevis distingojn, la paro Langlet ricevis nenion. Post protestoj de multaj helpitoj, la hungara prezidento Tildy sendis distingon per poŝto al Valdemar Langlet.

Memortabulo en Budapeŝto



Ili vivis malriĉe, unue ĉe geamikoj, poste en iu ne bone ekipita libertempa domo ekster Katrineholm. Valdemar skribis lingvajn artikolojn kaj Nina instruis muzikon. Valdemar ricevis finfine malgrandan pension.

En Budapeŝto oni honoras Valdemar kaj Nina Langlet kaj iliajn agadojn dum la malfacilaj jaroj 1944-45. Inter alie lernejo en la IV-a distrikto portas la nomon *Langlet Valdemár Általános Iskola*, situanta ĉe la Langlet Valdemár utca. En 2013 oni donis la nomon *Valdemar és Nina Langlet rakpart* al parto de la donaŭa taluso.

En Yad Vashem, Izraelo, Valdemar kaj Nina Langlet en 1965 estis nomumitaj kiel „righteous“ [justaj] pro sia agado.

Sumigo

Bedaŭrinde multajn pionirojn kaj iliajn gravajn agadojn ni forgesis. Eble ni aŭdis pri kelkaj kaj rekonas iliajn

nomojn. Valdemar Langlet estas unu el ili. Li multon faris je la komenco de la esperanta movado, ne nur por la sveda movado, sed ankaŭ internacie, ekz. kiam li kunfondis la gazeton *Lingvo Internacia*. Per siaj vojaĝoj li ankaŭ bone montris la utilon de Esperanto.

Esperantistoj ankaŭ havas sian “civitanan“ vivon en la socio kie oni vivas kaj agadas profesie. Valdemar Langlet faris multajn kaj honorindajn laborojn por homoj kiuj bezonis ian formon de helpo, kaj precipe dum la dua mondmilito en Budapeŝto.

Ne troviĝas multe da informo pri lia esperanta agado dum la lastaj jardekoj, sed tio neniel malgrandigas lian kaj esperantan kaj homarecan gravecon.

Laŭ persona informo de loka esperantisto, li post la reveno al Svedio, aktivis kaj partoprenis kaj ankaŭ prelegis en la svedaj esperanto kongresoj ĝis sia morto 1960.

☞



*urigu viajn pensojn.
Se vi ne havos malpurajn pensojn,
ne ekzistos malbonaj agoj.*

Konfuceo

Ed Borsboom.
Kie miozotas memor'.
Internacia Esperanto Instituto.
Hago 2017. 165 p.

Recenzo

Leif NORDENSTORM

La nederlanda esperantisto Ed Borsboom dum la jaroj 1960-2015 regule verkis artikolojn por diversaj Esperantaj gazetoj. Amiko rekomendis al li elekti kelkajn el ili por eldoni. Dum la elektado la verkinto rimarkis ke multaj el liaj artikoloj temis pri diversaj esperantistoj, kaj li decidis eldoni elekton de tiuj ĉi biografietoj. Tio estis saĝa decido, pro kiu la libro havas klaran temon: la vivo de konataj kaj kelkaj ne tre konataj esperantistoj.

Laŭ la verkinto la elekto estas hazarda. Tio donas al la leganto la eblecon konatiĝi kun konataj esperantistoj kiel ekz. Andreo Cseh, la kreinto de la siatempe pionira Ĉe-metodo instrui Esperanton. Aperas biografioj ankaŭ pri aliaj konataj esperantistoj kiel Eugeno Lanti kaj Ernest Drezen. Pri aliaj esperantistoj aperas ne biografioj sed rakontoj pri specifaj agadoj en iliaj vivoj, ekzemple pri la korespondado inter Marjorie Boulton kaj William Auld, pri Humphrey Tonkin kiel tradukanto de Shakespeare kaj pri Ebbe Vilborg kaj lia laboro pri etimologio. Kiam Borsboom skribas pri la ĉeĥa verkisto Karolo Piĉ, la teksto temas pri vojaĝo al Ĉeĥoslovakio kaj renkontiĝo kun la verkisto. La libro sume enhavas tridek unu artikolojn pri esperantistoj mortintaj kaj vivaj.

La varia maniero priskribi la personojn estas vera avantaĝo por la libro.

La verkinto ne devigas sin listigi faktojn pri naskiĝjaro, naskiĝloko, edukado, loĝloko, esperantistiĝo kaj tiel plu. Tute male lia skribado koncentriĝas sur aferoj, kiuj povas esti interesaj por la leganto. Ĉu vi ekscias ke en 2010

malaperis esperantisto? Kaj kiamaniere saviĝis la manuskripto de la verko *Metropoliteno* de V. Varankin? La respondojn de tiuj demandoj kaj multajn aliajn interesaĵojn oni povas legi en *Kie miozotas memor'*.

La libro estas bonega legaĵo por Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la historio kaj kulturo de Esperanto, sed kiu ne volas legi dikegajn librojn. La 31 artikoloj estas ĉiuj memstaraj. Tial la artikoloj ankaŭ estas uzablaj kiel legaĵoj dum klubaj kunvenoj. La lingvaĵo estas bona kaj ĝuiga. Mi tamen volas komenti unu vorton: oni ne "selektas" sed "elektas" artikolojn.

La kovrilo belas kun historia foto pri la reĝina elekto dum la TEJO-kongreso en 1956. Nebula tamen estas la titolo de la libro. Eble iu alia komprenas ĝin.



INVITO al 22-a Ekumena Esperanto-Kongreso

Poděbrady estas trankvila baneja urbo (13000 loĝantoj) 50 km oriente de Praha, kie oni kuracas malsanojn de koro kaj sangcirkulado. Minerala akvo, belaj parkoj kaj pura aero ebligas agrablan ripozon kaj ankaŭ fratecan kongresadon..... **nepre venu!!**




Agrikultura mezlernejo
- nia kongresejo -


Niaj ekskurslokoj:



unika mezepoka urbo **Kutná Hora**
toviganta sur la UNESKo-listo



kastelo **Chlumec nad Cidlinou**



distrikta urbo **Nymburk**



Přerov nad Labem – skanzeno
de popola arkitekturo

kaj multaj aliaj....

Sekcio de kristanaj esperantistoj de ĈEA sincere invitas Vin
partopreni la 22-an

EKUMENAN ESPERANTO-KONGRESON

(70-an kongreson de IKUE kaj 68-an kongreson de KELI)

6. - 13. 8. 2018, PODĚBRADY, Ĉeĥio

ALIĜILO

Familia nomo: Persona nomo:

Adreso:

Lando: Telefono:

Retadreso:

Mi mendas ĉambron: unu-litan du-litan tri - litan

Mi preferas loĝi kun:

Mi estas vegetarano: JES / NE

Garantian sumon: EUR/CZK mi pagis al:

Dato:.....

subskribo





Organizaj informoj:

Mi postulas (specialajn dezirojn) :

.....

.....

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn: JES / NE

Mi povus prelegi pri :

.....

.....

Mi alveturos: trajne / buse / aŭtomobile

kiam (proksimume):.....

Notoj de LKK:

.....

.....

.....

.....

.....

Kongresloko:

La kongreson povas partopreni ĉiuj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

Poděbrady estas ĉarma baneja urbo 50 km oriente de Prago kaj estas bone atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile (parkejo ĉe la kongresejo). Kongresejo estas: Střední zemědělská škola, Boučkova 365. En la studenta hejmo estas nur 3-litaj ĉambroj, ĉiuj kun necesejo kaj duŝo (sed vi povas esti sola aŭ duope).

El provizora programo:

- ☆ oficiala malfermo de la kongreso
- ☆ matenaj kaj vesperaj preĝoj
- ☆ interkona vespero
- ☆ ekumena diservo
- ☆ trarigardo de la urbo
- ☆ prelegoj, kantado
- ☆ koncertoj
- ☆ jarkunveno de IKUE kaj KELI
- ☆ tuttaga busa ekskurso al historia urbo **Kutná Hora** aŭ kastelo en **Chlumec n/Cidlinou** kaj ĉevalbredejo **Kladruby n/Labem**.

Kostoj:

Sumoj estas	◇ La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo ◇	Kongres-		
en EUroj	ĝis 31.12.2017	ĝis 31.3.2018	post 1.4.2018	kosto
Kategorio A :	10	20	30	150 (200)*
Kategorio B :	30	40	50	250 (300)*
Kategorio A:	eksocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko			* unulita ĉambro
Kategorio B:	ĉiuj aliaj landoj			

- Sendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-postĝirkonton aŭ pagu prefere al: **ING BANK** en NL al **Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam** por konto **kelk-p de KELI**
BIC: INGBNL2A **IBAN:** NL 72 INGB 0000 3789 64

Sendu la aliĝilon al:

Pavel POLNICKÝ,
Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
Tel: +420 723 672 335
Retadreso: polnickypavel@seznam.cz




Informoj

Informo de la Vieno-muzeo

Ni ĝojas sciigi vin, ke la kompletaj tekstoj de la skanitaj periodaĵoj – pli ol 70 diversaj titoloj kun entute pli ol 900 jarkolektoj – estas sisteme traserĉeblaj laŭ unuopaj nocioj.

La traserĉo eblas pere de la retejo ANNO (AustriaN Newspapers Online): <http://anno.onb.ac.at/anno-suche#searchMode=complex&from=1>



Ekzemplo de skanaĵo.
Bedaŭrinde ne troviĝas skanitaj Dia Regno.

Korajn salutojn kaj bondezirojn,
Bernhard Tuidier

Bibliaj Tagoj 2018

Okazos en Mainz, Germanio.
De la 7a ĝis la 11a de marto 2018
(merkredo - dimanĉo)

Pli da informo kaj aliĝilo vi trovas en:
www.esperanto.de/keli
=> alklaku la Esperanto-version!



Katedralo de Majenco

A lfa (A aŭ α) kaj omega (Ω aŭ ω) estas la unua kaj lasta literoj de la greka alfabeto. Kune ili ankaŭ estas atribuataj al Kristo kaj Dio en la libro de Apokalipso. Ĉi tiuj du literoj estas uzataj kiel kristana simbolo, kaj ili estas ofte kombinitaj kun la Kruco, *Chi-rho*, aŭ aliaj kristanaj simboloj.



La *chi-rho*- simbolo kaj la alfa-omega

La termino *Alfa kaj Omega* venas de la frazo “Mi estas la Alfa kaj la Omega”, en la libro de Apokalipso 1:8, 21:6 kaj 22:13. La unua parto de ĉi tiu frazo estas trovita en ĉiu manuskripto de Apokalipso, kiu havas tiun versiklon. Pluraj postaj manuskriptoj ripetas la frazon ankaŭ en 1:11, sed ĉi tie ĝi ne ricevas subtenon de la plej multaj el la plej malnovaj manuskriptoj. Ĝi estas preterlasita en iuj modernaj tradukoj.

Dufoje, kiam la frazo “Mi estas la Alfa kaj la Omega” aperas, ĝi estas kompletigata kaj klarigata per la aldona frazo, “la komenco kaj la fino” (Apo 21:6, 22:13). La literoj de la greka

alfabeto estis uzataj, ĉar la libro de Apokalipso, kiu troviĝas en la Nova Testamento, estis origine skribita en la greka lingvo.

Ĉi tiu frazo estas interpretata de multaj kristanoj, ke Jesuo jam ekzistis kaj ekzistos por ĉiam aŭ ke Dio estas eterna. La literoj Alfa kaj Omega, kiel kristana simbolo, estis ofte uzata en la frua kristanismo kaj aperis en la romaj katakomboj.

Fakte, malgraŭ ĉiam esti grekaj, la literoj estis uzataj pli ofte en la okcidenta ortodoksa kristana arto ol en la orienta. Ili ofte estis montritaj sur la maldekstra kaj dekstra flankoj de la kapo de Kristo.

☩



4-a jarcento, en la romaj katakomboj. Alfa kaj omega pentritaj ekster la halo.

En la biblio

500 jarojn post la Reformacio — Kion ni povas lerni?



1. En la bib - li - o, per pre - di - koj,
2. Pen - si mem - sta - re, ne laŭ - is - me,
tro - vi la vor - ton, fi - di al ĝi.
kle - re, ra - ci - e kaj kun pru - dent',

- | | |
|---|--|
| 3. individue, kor-intime,
laŭ-konsciencie, sen kuratel'. | 9. Bunta vario religia:
En la Spirito regas liber'. |
| 4. Scii, ke Dio ĉiun vokas,
per sia vivo servi al Li. | 10. Ĉiam en movo, reformendaj:
Tiel ni pretu por la def'. |
| 5. Ĉiu baptito estas pastro.
Privilegioj ne estu plu. | <i>aldone:</i> |
| 6. Kune kantante, muzikante,
ĝoju la koroj pri sia Di'. | 11. Tipe kristane: Ekumene
doni ateston pri Krist' Jesu'. |
| 7. Nek povas esti kred' sen amo,
nek la libero sen respondec'. | 12. Lerni, la unuj de l' aliaj.
Paŝi kuraĝe al unuec'. |
| 8. Ŝtat', eklezio, ne miksitaj,
agu komune por ĉies bon'. | |

EN LA BIBLIO • laŭ faldfolio de la Evangelia Landa Eklezio en Virtembergo • M kaj E
(originale verkita): Albrecht Kronenberger 2017-09-06

http://www.reformation-wuerttemberg.de/fileadmin/mediapool/gemeinden/E_reformation_wuertt/PDFs/Kreuzflyer_einzelseiten_safe.pdf

La krucoforman 12-paĝan faldfolion "Was verdanken wir der Reformation? 10 Gründe zum Feiern – nicht nur für Evangelische" sendis al mi Karl-Heinz Schaeffer.